FN PERANC 47

NORMANDA ESPERANTO BULTENO

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie
- N° 39 - - Avril 1957 -

Redaktas S-ro M. HUET, 1 Allée Pigny, LE HAVRE (Seine-Maritime)

# Ni iru antaŭen !

Kio estas "kongreso"? Teorie, kongreso estas kunveno kiu celas la ekzameno de la laboro farita de la antaŭa kongreso, kaj de la laboro farendo ĝis la proksima kongreso.

Ĉu, en niaj normandaj kongresoj, ni faras tiun laboron? Ĉu ni faras efikan laboron?

Certe, la sekretario kaj la kasisto legas siajn raportojn. Ĉiuj aprobas kaj aplaŭdas. Poste, parolas la delegitoj de la diversaj grupoj. Ĉiu estas sufiĉe kontenta kaj esperas "fari pli bone la proksiman fojon". Tiam, oni elektas la urbon kiu havos la honoron (sed, ankaŭ la malfacilaĵon!) organizi plensukcesan kongreson. Sed, pasas rapide la tempo. Do, oni manĝas, oni kantas. Ĉiuj estas bonhumoraj! La kongresanoj vizitas la urbon,promenadas kaj,kontentaj pro amika renkonto, ĉiuj reiras hejmen. "Ĝis la proksima Kongreso!"

Jen, geamikoj, kio estas niaj kongresoj: amikeco (kaj tio estas tre bona, komprenebla!), paroladoj, gratuloj, aplaŭdoj, ... vento!

Ni mem nur povas fari ke nia Kongreso 1957 estu "alia aĵo". Unue,sincere, ni diru kion ni faris por disvastigi nian lingvon. Ni diru, al la kongresanoj, ĉu ni sukcesis, ĉu ni malsukcesis, kiamaniere ni agis. Tial, la praktikado de la unuj povos profiti al la aliaj. Due: la estonteco. Ne estas subite ke oni povas ellabori programon. Tial, de nun, mi proponas al vi pripensi pri la sekvanta punkto: plej bona propagando estas la instruado de nia lingvo.

Sur la mapo de nia regiono, kelkaj verdaj steletoj indikas la lokojn kie troviĝas grupo. Se ni ja deziras ke tiu mapo, similanta al niaj normandaj kamparoj printempe, plenigu sin per verdaj steletoj, kaj ke tio efektiviĝas, tiam, ni estos farintaj bonan laboron.

Kiel trafi tiun celon? Mi opinias ke estas eble diskovri en ĉiu "kantono" almenaŭ unu Esperantiston kiu bonvolos doni, ĉiusemajne, unu horon de sia tempo por instrui nian lingvon. Do, se eble, venu al la Caen'a Kongreso kun nomoj de Esperantistoj kiuj respondis jese al viaj petoj. Kun tiuj armiloj, ni povos esperi fari grandan paŝon antaŭen.

Maurice HUET
U.N.E. Vicprezidanto.

# Korespondu !

ĈEĤOSLOVAKUJO .- Sinjoro Antonin Skládal, Drahobejlova 39, PRAHA 9 (C. S. R.) deziras interŝanĝadi bildkartojn, fotografaĵojn kaj ilustritajn revuojn.

Afranku filatele!

★★★★★

FN PER ANC 47

EN CAEN, Salle des Beaux-Arts, la 4 / 5 -ajn DE MAJO 1957

# KONGRES

Comité d'Honneur

M. le Recteur de l'Académie de Caen
M. le Maire de Caen
M. le Président de la 4° Région économique
M. le Président du Syndicat d'Initiatives

Programme

Samedi 4 Mai, à 21 heures

- Allocution de présentation et d'ouverture du Congrès par M$^{e}$ DUTHILLEUL
- Conférence de M. PETIT, et présentation d'un film
- Election de Fraùlino Esperanto
- Saynètes par les élèves de F-ino CHERIE, et choeurs par la Chorale de Vire

Dimanche 5 Mai

- 10 h.- Ouverture du Congrès U.E.N., allocution de son Président, S-ro BOSC.
- 11 h.45 - Réception à l'Université
- 12 h.30 - Déjeuner au Hall des Expositions (prix: 400 Fr environ)
- 14 h.30 - Saynètes, choeurs, jeux, etc ...

Por iri al la Kongreso, oni povas uzi la aùtobuson: direkto: "Venoix" aù "la Maladrerie"; stacio: Tribunaux (Palais de Justice).

SENDU TUJ VIAN KOTIZON (100 Fr) al Mme DUTHILLEUL, 35 Rue de Bayeux, CAEN
Poŝtĉekkonto: ROUEN 123-37

## *Nia Vivo*

ROUEN.- Ĉiumonata kunveno esperantlingva.
Esperanto Turisma Servo ricevas multnombrajn leterojn el la tuta mondo.

FECAMP.- Fame konata "Bénédictine"-likvorfabrikejo eldonis propagandilon en Esp. Ke viaj eksterlandaj korespondantoj demandu ekzemplerojn al tiu firmo.

LE HAVRE.- En Februaro, 40 personoj partoprenis vespermanĝeton; grupo da infanoj kantadis en Esperanto kaj dancis. Agrabla vespero tio estis. Ni tre bedaùras ke nia amiko LETENDRE rezignis sian oficon kiel kasisto de la Havra Grupo. Forironte nian grupon, li ricevis gratulojn por sia bona administrado.

EVREUX.- Kurso de nia dinamika Samideanino P. MONTAGNÉ.

## LASTMINUTE

NE FORGESU resendi rapide la peticiojn favore al instruado de Esperanto kiel 2a lingvo en niaj liceoj al S-ro A. RIBOT, Secrétaire de U.E.F. MARMANDE (L. & G.)

* * * * *